

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2019

Jarkolekto 6 - Numero 3



Hans Hesse (1497-1521) Annaberga Bergmanns-altaro: monerprego

ENHAVOTABELO

de julio 2019

Titolpaĝo: <i>Hans Hessen (1497-1521) Annaberga Bergmanns-altaro: monerprego</i>	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni !.....	3
Moneroj & medaloj	4
<i>KANNEL – Arta konkurso 2003</i>	
<i>Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco 1991</i>	
<i>8 Internacia Esperanto-Kongreso 1998</i>	
<i>Jubilea medalo: TEJO 80-jara</i>	
<i>Postekzamena sindikata premio-medalo</i>	
Por spuremuloj!	13
Spikumajoj & suplementoj:	15
Medalistoj: 17 Paul Huybrechts (°1951).....	16
Aspektoj de numismatiko: Oficialaj distingoj por d-ro Zamenhof (2)...	18
Historiaj aspektoj: Esperanta numismatiko en uniformo (2).....	20
Terminaro: Alfabeto listo (18)	22
Numismatika forumo: “Ĉu oni reviziu la spesmilon?” (3) de Terry Watts	23
El la gazetaro	25
Retpoŝto	26
Anoncoj & eventoj	30

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: www.ena.fr.ali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

Mono

Rilate al mono lingvoj tute malsamas.

Anglo “makes money”, li faras monon.

Nederlandlingvano “verdient geld”, li meritas ĝin.

Franco “gagne de l’argent”, li gajnas monon.

Litovo “izdurbo pinigų”, li perlaboras ĝin.

Hungaro “pénzt keres”, li serĉas monon.

Feliĉe Esperanto donas amason da alternativoj, tiel ke ĉiuj trovas sian preferon: laborakiri, indi, perlabori, gajni, lukri (laŭ la Vortaro de Petro De Smedt), sed ankaŭ enspezi kaj aliaj vortoj ekzistas kaj uzeblas. (El ‘Esperanto 3000’, revuo de aprilo-junio 2019)

Ĉi supra artikoleto estas por la redakcio hazarde okazo por atentigi nian karan legantaron pri unu el la du pli praktikaj celoj de ENA. Evidente, ni celas unuavice plejeble baldaŭ kompili la unuan eldonon en la movada historio de la unua “Katalogo de esperantaj numismatikaĵoj”, sed fak(grup)o sen kompilita trezoro de bazaj fakaj terminoj estus ja malkompleta.

Fidelaj legantoj sendube jam rimarkis, ke en neniuj numero de “Esperanta Numismatiko” la rubriko “Terminaro” mankas. Ĝi estas enciklopedieca, klariganta, alfabetita listo, do ne tabelo kun numismatikaj terminoj en diversaj lingvoj. Por kompili tian tabelon, ni ricevis la helpopromeson de kara volontula paro de vienaj gesamideanoj jam en la epoko de la unuaj paŝetoj de la ENA-revuo. Ni tial iom hontas, ke ni ĝis hodiaŭ nur antaŭdankis, ne jese reagis. Tamen nek pro manko de aprezo nek pro manko de intereso. Tute male! La dilema problemo estas, ke ni ne jam povis decidi. Unuflanke ni ja opinias, ke ni unuavice konsideru la geesperantistojn kiel la plej valorajn “klientojn” de nia faka asocio, aliflanke ni konscias, ke multlingva, tabelita listo en rondoj de internaciaj numismatoj eble pli profunde imponus, rilate al la komunikaj taskoj kaj valoro de Esperanto en la vasta mondo.

Karaj ENA-anoj, same karaj aliaj legantoj, ni donas tiurilate nun la parolon al vi! Ni vere esperas ricevi multajn efikajn kaj taŭgajn proponojn...

Bert

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A 2- Esperanto-medaloj kun ne-esperanta(j) aldono(j)

KANNEL - Arta konkurso 2003



Lando: Estonio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: *serĉata*

Diametro: 50 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 2003

Diko: 1 mm

Averso (*unuflanka medalo*):

“artisteca” vizaĝo en profilo dekstren. Longhara barbulo ŝajnas kanti aŭ deklami.

Teksto: “■ KANNEL ■ arta konkurso”. Lakona medalo koncerne informojn, ekzemple pri dato kaj loko.

Rimarko 1:


“Kannel” estas nomo por olda pinĉteknike ludata kordinstrumento el Estonio; la oficiala muzika termino en Esperanto estas “kantelo”.



En 2003 okazis konkurso por ludantoj de tiu instrumento okaze de la tiama BET. Iom strange ŝajnas, ke por la medalo oni preferis bildon de kantisto (?), anstataŭ de instrumento aŭ ludisto.

Rimarko 2:

“Balt(i)aj Esperanto-tagoj” (mallonge: BET) estas Esperanto-renkontiĝoj, organizataj ĉiujare ekde 1959 en iu el la apudbaltmaraj ŝtatoj, laŭvice en Latvio, Litovio kaj Estonio. En 2003 la evento okazis en la estonia urbo Tartu (vidu la mapeton!).



Rimarko 3:

La medalo sur la bildo troviĝas en la numismatika kolekto de la Esperanto-Muzeo en Vieno.

La redakcio kore dankas s-rojn Povilas Jegorovas el Litovio kaj Tonu Hirsik el Estonio pro nemalhaveblaj informoj pri la medalo!

Tipo D 1 – Unuflankaj medaloj

Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco 1991



Lando: Litovio

Substanco: argilo

Diametro: 92 mm

Jaro: 1991

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 100 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso: (*unuflanka medalo*)

maldekstre: granda duona stelo

de maldekstre mezen (horizontale): stiligitaj literoj: **IMEK**

dekstre: “INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO (tiel!) KONFERENCO”

“LITOVIO KAUNAS 19.25.07.1991”

Rimarko 1:

ENA jam priskribis ok diversajn medicinistajn Esperanto-medalojn, el kiuj nun la unuan IMEK-memormedalon!

Rimarko 2:

ĝis nun al ni estas konataj 11 argilaj Esperanto-medaloj el Litovio, emisiitaj inter 1981 kaj 1992.

Tipo D 2 – Murmedalonoj

8 Internacia Esperanto – kongreso 1998



Lando: Usono

Substancoj: ligno + bronzo

Jaro: 1998

Diametro: ligna disko: 159 mm
bronza disko: 135 mm

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 200 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: 15 mm

Averso: *(unuflanka medalo)*

Ĉirkaŭskribo: 8 INTERNACIA ESPERANTO – KONGRESO • *(pliaj informoj serĉataj!)*

Meze: la pendoponto de San-Francisko, la fama “Golden Gate Bridge” finkonstruita en 1937.

Sube: KALIFORNIO USONO 6 – 12 NOVEMBRO 1998 •

Rimarko:

supre-dekstre “glumarko” de la asocio “Monda Turismo Esperanto”

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Jubilea medalo: TEJO 80-jara



Lando: Nederlando

Metalo: zinko (arĝentita kaj polurita)

Diametro: 40 mm

Jaro: 2018

Kvanto: 200

Pezo: 22,40 g

Rando: tranĉa

Diko: 4 mm

Averso:

ĉirkaŭa surskribo: “TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO”

meze: papageto “Pepo” kun esperanto-flago

sube: 1938
2018

Reverso:

slogano: JUNE KAJ KUNE

meze: : papageto “Pepo” sur terglobo

sube: ★ 80 ★
JAROJ

Rimarko 1:

Kreis ĝin la TEJO-volontuloj per bildoj de Pepo el Telegram.

Rimarko 2:

Pregis ĝin la firmao Wenzhou Maotong Crafts Co., Ltd, en Zhejiang, Ĉinio.

Rimarko 3:

La medaloj estis kreitaj okaze de la 80-jariĝo de TEJO kaj senditaj kiel donaco al ĉiuj TEJO-patronoj.

Rimarko 4:

Ambaŭflanke troviĝas la sama bestsimbolo, nome papag(et)o. Sur la plastaj stelo-moneroj emisiitaj en 2012, kutimaj pagiloj en kunvena salono (la t.n. gufujo) de esperantaj gejunuloj, oni vidas tri diversajn bestsimbolojn. Unu el ili estas papageto, laŭdire simbolo de interparolado en la trinkejo (senalkohola!). Tia ĵetono estus ofte elspezata por aĉeti manĝaĵojn, kaj tiuj kiuj estas fine sataj, laŭdire poste vigle babilas kiel papagoj. (Vidu ankaŭ: jk.5, n-ro1, p. 33 + jk.5, n-ro3, p. 15)



La ENA-redakcio dankas la samideanojn de TEJO pro la interesaj kaj kompletigantaj informoj!

Tipo B 2 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj kun esperanta(j) aldono(j)

Postekzamena sindikata premio-medalo



Lando: Britio

Metaloj: bronzo / latuno

Diametro: 45 mm

Jaro: *serĉata*

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 44,20 g

Medalisto: firmao Vaughton

Diko: 4 mm

Averso:

ronda rubando kun emblemo: “FAC ET SPERA” (agu kaj esperu)

tutemeze: ŝildo kun literoj **N**(ational) **U**(nion) of **T**(eachers) = nacia sindikato de geinstruistoj. En la rubando sur soklo: du alegoriaj figuroj kun enmane respektive (lerno)libro (= virino) kaj torĉo (= viro).

Supre: bovloforma lampo kun flamofasko kaj laŭrofolioj.



Sube: ornamaĵo kun stiligitaj floreto kaj branĉetoj.



Reverso:

ĉirkaŭa teksto: “EXAMINATIONS BOARD OF THE NATIONAL UNION OF TEACHERS” (= “ekzamena komitato de la nacia sindikato de geinstruistoj”).

Tute sube: ornamaĵo (stiligita duobla branĉeto, glacikristal-forma).

Meze:

AWARDED TO

E.E.YELLAND.(gravurite aldonita)

FOR PROFICIENCY IN

ESPERANTO(gravurite aldonita)

Signifas: “atribuita al E.E. Yelland pro lerteco pri Esperanto”.

Rimarko 1:

Alegoriaj figuroj:

la ina figuro maldekstre kun lernolibro probable simbolas la studendan sciencan, kiu kondukas al lerteco. La vira figuro montras torĉon kiel simbolon de fina klerigado.

Rimarko 2:

N U T: brita geinstruista sindikato, kiu aktivis de 1870 ĝis 2017, post kiam ĝi iĝis branĉo de National Education Union (= nacia sindikato pri edukado). En 2015 ĝi havis 372.136 membrojn! La sidejo troviĝis en Londono.

Rimarko 3:

FAC ET SPERA : “emblemata” = emblemo + bildo, tre ŝatata precipe en la renesanca epoko. FAC devenas de “facere”, SPERA de “sperare”, do ambaŭ el la klasika latina. Ĝi estas aŭ estis la devizo de pluraj, diversaj asocioj (kiel tiu de la skota gento “Matheson”) kaj de privataj personoj.

Rimarko 4:

De tiu medalo ankaŭ ekzistas ekzempleroj en latuno:



Rimarko 5:

Jen alia samcela medalo, sed sen esperanta aldono, tute anglalingva.

Atribuita al iu Annie E. Stickland pro lerteco pri “millinery” (= ĉapelbutika lerteco). Esperanto estis do nur unu el pluraj kursoj, edukcele organizitaj de la sindikato.



Rimarko 6:

Vaughtons estis fondita en 1819 de Philip Vaughton. La firmao originale nomiĝis “P. Vaughton” kaj la sidejo troviĝis en Little Hampton Street en la kvartalo de la juvelistoj en Birmingham (Britio). Ĝi iĝis fama kiel produkto de butonoj, medaloj kaj moneroj sub la nomo “Buttonmaker, Medalist and Mint”.


La redakcio dankas nian kunlaboranton Terry Watts.

POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.

11a enigmo

Kiu malnodos tiun banton?



Ĉu la nomo de la medalisto?

Lando: Aŭstrio
Metalo: oro (AU)
Diametro: 55 mm
Jaro: 1957

Kvanto: *serĉata*
Pezo: *serĉata*
Medalisto: *serĉata*
Diko: *serĉata*

Averso:

busto de Franz Dörfel (1879-1959) dekstren. Teksto: "HOFRAT PROFESSOR FRANZ DÖRFLER";

Reverso:

ĉirkaŭa teksto: "FESTJAHR D.(ES) KAUFM.(ÄNNISCHEN) BILDUNGSWESENS I.(N) ÖSTERREICH 1957) (germane) (= festojaro de la komercista klerigo en Aŭstrio 1957)

meza teksto: "PRO MERITIS DE JUVENTUTE STUDIOSA SCIENTIAE RER.(UM) MERC.(ATORUM)" (en klasika latina) (= pro meritoj de la junularo studanta komercajn sciencojn)

Rimarko 1:


je la unua rigardo tiu memormedalo ŝajnas neniel tuŝi la temon Esperanton. Do, KIAL ĜI TROVIĜAS EN LA NUMISMATIKA KOLEKTO DE LA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO?

Rimarko 2:

en Wikipedia troviĝas i.a. la informo, ke tiu profesoro en 1940 (kiam li havis 61 jarojn) aliĝis al la NSDAP (Nationalsozialistische Deutsche Arbeiterpartei) kies estro estis iu Adolf Hitler ...



normala aspekto



virtuala, spegula rezulto



mezuroj de la stampilo: 130 x 50 x 10 mm



envaksigita marko



surpaperigita marko

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

La framasona loĝio “Esperanto” en Parizo (2)

En la rubriko “Historiaj Aspektoj” de la kvara numero de jarkolekto unu ENA jam unue menciis kaj montris la memormedalon framasonan, pri kiu raportis nia karmemora franca samideano Jean Amouroux en “Heroldo de Esperanto”, n-ro du de la 90a jarkolekto (2014). Ni denove montras la aversan flankon de tiu memormedalo (1913-2013) maldekstre. Dekstre la markon de la stampilo (freŝdate proponita en aŭkcio kontraŭ minimuma sumo de 350 eŭroj!).



Sur la stampo (marko) okulfrapas la devizo de la tiama presejo-librejo en Parizo, kiu estis propraĵo de la probabla loĝiestro de “Esperanto”, Jacques Camescane (1869-1941), kunfondinto Alfred Mithey (1873-1952).

La devizo “Homo mi estas: nenio homa estas al mi fremda”, estas libera traduko de sentenco de la romia dramaturgo Publio Terencio Afro (185-159): “Homo sum, humani nil a me alienum puto”. La devizo ankaŭ troviĝas sur oficejaj kartoj kun la adreso 55 rue de Douiai Paris, kie troviĝis la presejo-librejo de Camescane.



Julio Mangado Rosenören en la oficejo de la loĝio



Sildoj en la framasona templo

MEDALISTOJ

17. Paul Huybrechts (°1951)



Memporetro

Paul Huybrechts [paŭel hejbrehts] aktuale preparas, okaze de la 50-jariĝo de sia artista kariero, diversajn eventojn, kiuj okazos printempe de la jaro 2021. Ili koncernas ĉefe la eldonon de katalogo/enciklopedio kun proksimume 1 500 artefaktaj verkoj. Krome estas preparataj biografio kaj sinoptika ekspozicio, al li dediĉota de SAN (Arkeologia Societo de Namuro/Belgio).



Kiel junulo li studis en la Akademio de Belaj Artoj en la belga universitata urbo Loveno, sekve en la Arta Alternejo en Pforzheim (Germanio) kaj en 1971 li partoprenis en trijara staĝo en la famega entrepreno Huguenin Medailleurs en Svislando.

Post dekjara preparada lernotempo, li atentigis pri sia talento la Reĝan Monfarejon, la Belgan Poŝton kaj la privatan firmaon Fibru-Fisch. Li iĝis la pli juna gravuristo en la historio de la belgaj moneroj kaj poŝtmarkoj.

Fine de la sepdekaj jaroj li ekeldonis siajn proprajn medalojn. Li laboris aŭtonome koncerne temojn kaj kreadon, do sendepende de la fabrikantoj. Li kreis tiel diversajn artajn medalojn kaj dekon da moneroj en la valutoj BEF, ECU kaj EŬRO, krome kvindek da gravuroj por oficialaj poŝtmarkoj, kiuj estis



honorigitaj per sep Grandaj Premioj de la Filatela Arto.

Huybrechts estis/estas membro de pluraj asocioj, kiel la “Profesia Asocio de Majstro-Gravuristoj”, “Promocio de la Medalo”, “Eŭropa Kolegaro pri Moner-kaj Medalarto”, “Germana Asocio pri Medalarto” kaj la famega “Federacio Internacia de la Arta Medalo (FIDEM)”.

La belga medalisto estas ankaŭ la iniciatinto de la t.n. “komuna” arta medalo. Do jen medalistoj kreas unuope nur unu flankon de medalo, jen partoprenas en projektoj, en kiuj diversaj gravuristoj surloke kunlaboras. Tiel Paul iĝis pioniro, kiu sukcesis kunlabori samtempe kun pli ol 100 artistoj tutmondaj. Kompreneble tiuj kreaĵoj ricevis internacian famon.



La artistoj kunlaborante surloke kun diversaj tutmondaj kolegoj

Ĝis nun Huybrechts (re)kreis nur unu esperantan memormedalon por la iama belga asocio “La Hirundo” de Tienen okaze de ĝia 25-jariĝo. Ne nur en patinita bronzo, sed ankaŭ kelkajn ekzemplerojn en arĝento kaj unu en nepatinita bronzo por studi ties evoluon.



ENA jam priskribis tiun medalon en jk.4, n-ro1, p.7-8

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Oficialaj distingoj por Doktoro Zamenhof (2)

Duan oficialan distingon Zamenhof ricevis en Hispanio. Al li estis donita la alta distingo:

“Orden de Isabel la Católica”.



Favore al la honorigo per la titolo “Commendador” grave rolis la tiama hispana reĝo Alfonso 13a (1886-1941).



Lando: Hispanio
Metalo: orita arĝento
Pezo: 41,6 gr

Mezuroj: 58 mm x 78 mm / 98 mm
(sen/kun la foldo por la rubando)

Averso:

Sub la rubando (blanka kun “oraj” randoj) estas verda laŭrokrono. La kruco enhavas ok pintojn kun oraj kugletoj. La “brakoj” estas helruĝaj kun larĝa ora rando; inter tiuj brakoj troviĝas kvarfoje kvin oraj stiftoj. Sur la blanka ororanda ringo oni vidas la moton “A la Lealtad Acrisolada” (= pro pruvita fideleco).

En la medaliono: la ruĝaj kolonoj de Heraklo, kun la moto, sur flava rubandeto, de Karolo 5a “PLUS ULTRA” kaj du bluaj kronitaj globoj.

Reverso:

Sama aspekto, sed sur la blanka ringo oni vidas “Por Isabel la Católica”.

En la medaliono: sur blua fono la orkoloraj interplektitaj simboloj: F 7 B O

F 7 = reĝo Ferdinando 7a

BO = gento de Bourbon

En 1909 okazis en Barcelono la kvina Universala Kongreso. La reĝo Alfonso la 13a ne hezitis subteni la unuan esperantan kunvenon en Hispanio. Por li tio estis bona okazo por emfazi la urban kaj la kosmopolitan imagon de Barcelono. Li iĝis honora prezidanto de la kongresa komitato kaj instigis la gazetaron raporti pri la UK. Dankeme pro la honora titolo por Zamenhof la hispana prezidanto de la Madrida Esperantista Grupo, José Perogordo, reciproke donacis al la reĝo numeron



Alfonso la 13a

de la internacia gazeto “La Revuo”, bindita en oro. La reĝo laŭdire trafolumis la revuon kaj voĉlegante kelkajn frazojn li pruvis, ke li lernis Esperanton. Tute ne mirinde, ke esperantlingvaj gazetoj kiel “Sunio Hispana” raportis jen en la hispana kaj en Esperanto pri tiu evento: *“GRAVEGA SCIIGO: La Reĝa Hispana Moŝto nomis Komandoro de la Elizabeto la Katolika, nian karegan Doktoron S-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof. La SUNIO HISPANA ĝoje gratulas la eminentan ordeniton kaj salutas la nediskuteblan trunkon de la hispana esperantistaro, S-ro Codorniu, kiu estis la unua kiu povis doni tiel bonan sciigon al ni kaj al ĉiuj.”*

La reĝo daŭrigis helpi la hispanan esperantan movadon per financa subteno por organizi la duan Iberan Esperanto-Kongreson en Zaragozo. Probable pro la influo de la esperanta humanismo, li aranĝis dum la Unua Mondmilito laŭdire la unuan humanan mision, rehejmigante vunditajn soldatojn, informigante familiojn sen novaĵoj pri iliaj gekaruloj kaj sendigante al militkaptitoj resanigilojn kaj monon.



La distingon ĉirkaŭ la kolo de Zamenhof, jam aljuĝitan en 1909, li nur ricevis dum la UK en Antverpeno en 1911

La redakcio dankas s-inon Jeannine Jacobs, sekretariinon de Medec, “Belga Historia Rondo de distingo- kaj medalokolektantoj”. Ŝi havigis al ni valoregajn informojn pri la priskribitaj distingo kaj la permeson publikigi la fotojn. Ni krome dankas s-ron Bernard Tuider, kiu sendis foton de la franca porzamenhova distingo, konservata en la Esperantomuzeo en Vieno.

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Esperanta numismatiko en uniformo (2)


2. La fondo de “Internacia Policista Asocio” (I.P.A.)

En 1928 fine aperis la ununura konata esperanta medalo kun temo “polico kaj Esperanto”.

Por honori kaj danki individuojn kaj grupojn de kunhelpintoj de la 20a Universala Kongreso de 1928 en Antverpeno, la Loka Kongresa Komitato (LKK) estis komisiinta al la belga skulptisto-medalisto Rik Sauter skizi “novan” medalon surbaze de jam ekzistanta medalo sen jarindiko de la sama artisto, verdire derivaĵon, ĉar la busta flanko restis identa. Ambaŭ ni jam montris kaj priskribis en jarkolekto 4, n-ro 1, p.4-8.

Al la redakcio estas konataj nur du specimenoj de tiu derivaĵo kun la komuna teksto “20a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO – DANKEME AL ... PRO AFABLA KUNHELPO EN LA KONGRESLABOROJ” kaj nomoj de policaj grupoj.

La malfondo de TPL okazis ĉirkaŭ la jaro 1938 kaj la fondo de nova ligo, en kiu Esperanto nur flanke roletis, nur je la unua de januaro 1950. La liga nomo estis “International Police Association” (internacia policista asocio), pli bone konata sub la siglo I.P.A. Fondinto estis la brita policisto Arthur Troop (1914-2000).



Ekde tiam la ĉefa laborlingvo estas la angla. Do, ankaŭ en tiu kampo la unua mondmilito (kaj poste la dua) estis teruraj bategoj por la Esperanto-movado. La anglalingvaj potenculoj ne nur ekonomie sed ankaŭ politike konsideris la ege damaĝigitajn landojn, kaj venkintajn kaj venkitajn, kiel satelitajn ŝtatojn kaj diversmaniere plifortigis tiun potencon per kultura kaj lingva ondegoj. Estas (ad)mirinde, ke Troop, kiu estis brito kaj kompreneble ne ŝuldis pri la hegemonio de la angla, respektplene konservis la esperantan sloganon: “Servo per amikeco”. Li estis sincera pacifisto kaj idealisto, kiu kreis la plej grandan mondvastan polican organizon.

En 1965 li ricevis la “British Empire Medal” (britan imperian medalon); poste li iĝis ankaŭ honora doktoro en Kanado kaj ekhavis la honoran krucon el la manoj de la tiama aŭstria prezidento. En 1998 en Hungario estis starigita por li la “Arthur Troop-statuo” kaj li krome ricevis la Oran Glavon de la hungara ŝtato.

Okaze de la 11a mondkongreso de I.P.A. en 1985, al li estis enmanigata la unua ora I.P.A.-medalo. Ĝi evidente montras ankaŭ la konatan rubandon kun la moto “Servo per amikeco”.

Kiel emeritulo li volontule laboris kun sia edzino, por helpi blindulojn, kaj ili kolektis monon por aĉeti blindulajn hundojn, vivante kaj agante laŭ la devizo de I.P.A. Dank'al ili I.P.A. nuntempe havas 400 000 anojn en 64 landoj!

Ŝajnas iom strange koncerne la polican fakon de nia numismatiko, ke nur ekde la fondo de I.P.A. aperis kaj aperas multaj objektoj, ornamitaj per la esperanta slogano kaj el ili sufiĉe da medaloj. El tiuj medaloj ENA akceptas kiel artefaktojn de esperanta numismatiko nur la numismatikaĵojn kun bone legebla esperanta devizo. Tiu regulo valoras ankaŭ por filatelistoj kiel la membroj de ELF-Arek.

En ĉinnumero ni montras kaj priskribas nur kelkajn el tiaj medaloj. La kvanto tamen estas sufiĉe granda por rikolti aliajn specimenojn por estontaj numeroj de nia revuo.



Arthur Troop kun la unua ora I.P.A.-medalo



La fama Arthur Troop-statuo en Hungario

Fontoj:

- “Enciklopedio de Esperanto”, represo de la unua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1986, p. 441-442
- Vikipedio: Ágoston Marich; Internacia Polica Asocio (I.P.A.); polico; Arthur Troop
- “Polizei und Esperanto” en diekriminalisten@at, reta revuo
- “Espéranto-info”, mai-juin 2016, p. 7. La franca teksto de Raymonde Coquisart estas traduko de originala artikolo de Elda Doerfler, prezidantino de la internacia filatelista asocio “ELF- Arek”

Daŭrigota

TERMINARO

Alfabeto Listo (18)

Akvomarko: *travidebla desegno, marko en papero, ekzemple en monbiletoj.*

Bolino: *vidu ankaŭ “potino”-n.*

Devizo: *mallonga frazo, akompananta blazonan insignon, montranta principon de konduto.*

Duiliono: *miliono da milionoj (10^{12}).*

Dumetalismo: *objekto konsistanta el du metaloj.*

Enkursigita: *kun spuroj de uzado kiel pagilo (monero).*

Faleristiko: *helposcienco, kiu studas la aspekton kaj historion de la kavaliraj ordenoj kaj aliaj distingo, afinaj al heraldiko kaj numismatiko. La tri helposciencoj havas komunajn esplorajn metodojn.*

Fandokvanto: *nombro de fanditaj aŭ fandendaj medaloj de la sama tipo.*

Filigrano: *vidu ankaŭ “akvomarko”-n.*

Groŝmono: *moneroj havantaj malmultan valoron.*

Luidoro: *malnova franca ormonero.*

Miliardo: *milo da milionoj (10^6).*

Mondona: *tia, ke el ĝi oni povas tiri profiton.*

Monertrovaĵo: *unu aŭ aro da retrovitaj, iam enfositaj moneroj.*

Monfari: *stampi aŭ pregi monerojn.*

Motivo: *temo ofte ripetita en artaĵo.*

Potino: *arĝenteca alojo de rustantaj metaloj kiel kupro, zinko, stano kaj plumbo. Ne ekzistas ĝenerala interkonsento, ĉu tiu alojo ankaŭ enhavu arĝenton. La termino estas aplikata por (antikvaj) grekaj kaj keltaj moneroj. Por romiaj oni pli ofte uzas la terminon “bolino”.*

Pregokvanto: *nombro da pregitaj aŭ pregendaj moneroj aŭ medaloj de la sama tipo.*

Quadratum incusum: *en antikvaj moneroj kun kvadrata enprofundiĝo averse.*

Sekigita stampo: *stampo sen uzo de inko, nur per pregado.*

Skizo: *unua prova dividaĵo de la estonte definitiva medalo aŭ monero, strekado de desegnaĵo, montranta nur la ĝeneralan dispozicion kaj la ĉefajn trajtojn.*

Ĉu oni reviziu la spesmilon?

Terry Watts

La spesmilo reviziata (3)

En antaŭa artikolo mi forpuŝis la ideon, ke la esperantistoj povu revivigi la spesmilon per or-enhava monero, supozante ke tio estas nepraktika.

Anstataŭe, por la relanĉo de la spesmilo en papera aŭ vulgar-metala formo, mi skizis kiel fidindigi la valoron surbaze de konverteblo ĉe la eldonanto (ĉu al oro, ĉu al or-ekvivalento en fiat-mono).

Tamen la esenco de spesmilo estas mono, kies internacia valoro devenas de la difino surbaze de certa kvanto da oro. Kaj tio nature starigis la demandon, kiun rolon havu la diversaj or-enhavaj moneroj, nun produktataj tra la mondo en multaj ŝtataj stampejoj.

Tiuj moneroj foje alprenas la saman specifon kiel la moneroj en la epoko antaŭ la unua mondmilito (MM1), foje oni kreis novajn dezajnojn. Ofte, en tiu lasta kazo, la moneroj estas el pura oro anstataŭ la pra-uzata fajneco kaj kun pezozoj rilate al troja unco anstataŭ la historiaj pezozoj.

Se tiuj moneroj estu parto de la revivigo de la ideo de or-ligita esperanta mono, indas rimarkigi, ke estas grava diferenco inter nun kaj 1907. Tiam oraj moneroj libere cirkulis kaj la nominala valoro estis egala al la or-enhava valoro. En bankoj en multaj landoj oni povis ŝanĝi sian monon en or-moneran formon sen perdo.

Sed kontraste al tiam, nuntempe (kiam ŝtato povas krei monon el nenio sen la disciplino, pri kiu or-normo insistas) oni devas pagi pli ol la valoron de la entenata oro, por ricevi or-enhavan moneron.

Tiel, nature, same estus, se iu samideana entuziasmulo decidus farigi esperantan moneron el oro, ĉar li havus kostojn kiujn li volus kovri.

Tamen estus tre agrable povi enpoŝigi oran moneron, vojaĝonte eksterlanden kun la certa scio, ke alveninte oni povas ŝanĝiĝin en la lokan valuton sen signifa perdo.

Por tia ideala situacio, ŝajnas al mi, estas nur unu solvo. Inter esperantistoj la ŝanĝ-valoro estu pli ol la valoro de la entenata oro. Sed ne tiom ke oni fi-profitu je reŝanĝo en fiat-monon, kaj ne tiom ke oni signife perdu je reŝanĝo.

Do akceptinte, ke la nun haveblaj oraj moneroj estu parto de la re-establo de or-ligita mono inter la esperantistoj, necesus fiksi la reprezentatan valoron de tiuj moneroj en spesmiloj.

Kredeble, kiel principo, oni interkonsentus, ke kiam iu or-enhava monero (laŭ dimensioj kaj fajneco) akordas kun la antaŭ-MM1-a specifo, tiam tiu monero havu la nominalan spesmilan valoron, kiun ĝi estus havinta originale.

Tamen estas eta komplikajo en la apliko de tiu principo.

Kiam de Saussure proponis sian difinon de la or-enhavo de 8 gramoj da 22-karata oro por 10 spesmiloj, li kredeble volis, ke laŭ tiu difino la ĉefaj tiamaj valutoj havu rondciferan valoron en spesmiloj. Pli malpli li sukcesis.

Sed eĉ en la kazo de la brita pundo (kies specifo certe influis lian decidon) li ne absolute atingis perfektecon.

La suvereno ja estis peco de 22-karata oro, sed pezis (kaj ankoraŭ pezas) 7.988 gramojn, ne ok gramojn, kio laŭ la de-Saussure-a difino donas valoron de 9,985 sm por 1 pundo anstataŭ 10 spesmiloj. Same, ekzakta kalkulo donas valoron de 3,9588 sm por dek frankoj (francaj, belgaj, svisaj) anstataŭ kvar spesmiloj, 2,0524 sm por unu tiama usona dolaro anstataŭ 2 spesmiloj.

Tamen ni povus, sen granda ĝeno, mi pensas, nun akcepti je la rondciferata valoro ĉiujn tiujn or-enhavajn monerojn, kiuj ankoraŭ estas stampataj (aŭ facile akireblaj kun pli fruaj datoj) laŭ la historia specifo.

Se tiel fiksiĝus la nominalaj valoroj, restas determini, kiun kurzon por la spesmilo oni apliku en la interŝanĝo kun ne-or-ligita mono. Gvidata de la pluskosto, kiun pagigas la Reĝa Stampejo ĉi tie en Britujo por unuopaj suverenoj, mi kuraĝas proponi, ke la spesmilo estu por tiaj interŝanĝoj konsiderata 0,8 gramoj da pura (24 karata) oro.

Tiu kurzo ne nur simple kaj plaĉe ligiĝas kun la historia difino, sed ankaŭ plifaciligus la kalkulojn de ekvivalentoj en fiat-mono. La historia difino de la spesmilo necesigus kalkulojn pri la valoro de 0,7333 (0,8 x 22/24) gramoj da oro.

Sed, kompreneble, se la transakciantaj esperantistoj interkonsentas pri alia ŝanĝ-kurzo, kiu kontentigas ambaŭ partiojn, ili povus tion apliki por tiu transakcio.

Do ni havos nur unu formulon (la de-saussuran) por fiksi, kiom da spesmiloj reprezentas iu ora monero, sed ankaŭ alian gvidan formulon, kiu valorigas tiun moneron en papera mono. Kaj tiel oni ne signife perdos, reŝanĝante spesmilojn en paperan monon, malgraŭ tio, ke oni devis pagi pli ol la valoron de la entenata oro, por havigi al si la moneron.

Kiel mi diris, ne ĉiuj oraj moneroj nun haveblaj estas stampataj en 22 karata oro (la bazo de la historia formulo), sed ne estas malfacila afero kalkuli la ekvivalentan pezon.

Ekzemplo klarigos. Supozu moneron el 999-oro kiu pezas duonan fajn-uncon (15,55 gramojn). Se tia monero estus el 916 (22 karata) oro (tamen kun la sama entenata oro), ĝi pezus $(999/916) \times 15.55 = 16,96$ gramojn. Do ĝia nominala spesmila valoro = $21,2$ sm ($16,96/0.8$).

Konklude, antaŭ ol persvadi la landajn asociojn (aŭ privatajn entreprenemajn esperantistojn) pri produkto de paperaj aŭ vulgar-metalaj spesmiloj (kaj ties subdividoj), ni povus jam nun profiti de la vasta tutmonda stoko de or-enhavaj moneroj.

Kia ajn estas via opinio, kara leganto, pri la dezirindeco de la revivigo de la spesmilo (aŭ la tuta ideo de or-bazita esperanta mono), ĉu vi estas certa, ke vi povas taksi la kasandrajn profetaĵojn pri la venonta financa krizo kiel ignoreblajn? Ĉu vi fidus pri la kompetento de ŝtatoj kaj centraj bankoj, ke ili ne daŭre koruptos vian monon?

Daŭrigota

Impostoj en Wijnegem en la 16a jarcento



La longtempe kaj erare tiel nomata “La popolnumbrado en Bet-Leĥemo”, famega pentraĵo de Petro Bruegel la Maljuna, ĝuste nomiĝu “**Imposto en Wijnegem**” [vejnegem].Fakte, imposto anstataŭ “la” imposto, ĉar tiutempe tro ofte la popolo estis premata per **oficialaj rabiroj, por finance projektojn de ekleziuloj kaj nobeloj.**

Tamen, la pentristo ne kreis tiun majstraĵon kiel kritikon kontraŭ la habsburga estraro, sed laŭ komisiono de eminenta negocisto. Tiu novaĵo estas la freŝdata rezulto de esplorado fare de Sabine van Sprang kaj Tine Meganck, du flandraj arthistoriistinoj.

Tro longtempe Bruegel estis konsiderata kiel ribela pentristo. La du eruditinoj profunde esploris en liaj pentraĵoj indikojn koncerne ekribelon, sed la rezultoj montras multe pli nuancan bildon pri la artisto. Ili i.a. sukcesis identigi la komisiinton de la famega pentraĵo, iun Jan Vleminck, riĉegan antverpenan nobelan bienulon kaj komerciston, kiu en 1566 iĝis terposedanto de la regiono Wijnegem. **La verko do montras unu el la impostoj, kiujn Vleminck krompagigis de la loka komunumo kaj ne popolnombradon!**

La sciencistinoj trovis tiun historian konekton dank’al la figurita bieno, kiu fakte apartenis al tiu Jan Vleminck.

La konstatoj troviĝas en eldonota, nederlandlingva scienca verko kun la titolo “Bruegels Wintertaferelen” (“La dumvintraj scenoj de Bruegel”), fina rezulto de trijara esplorado kaj verkado. Ĝi estis prezentita en la Reĝa Muzeo de Belaj Artoj de Belgio en Bruselo, kie troviĝas la pentraĵo, verŝajne kopio fare de filo de la majstro.

El la nederlandlingva gazeto “De Morgen” (15/09/2018)

RETPOŝTO

De vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

04.04.2019 12:19

Kara amiko Jozefo!

Denove mi bezonas vian aglecan rigardon, por malkovri erarojn. Do, viaj korektoj kaj rimarkoj ree estos ege bonvenaj. Kiel kutime mi jam tutkore antaŭdankas vin. Resendo ne urĝas.

Pro la amplekso de la fotoj kaj tekstoj, mi sendos la novan numeron en 2 partoj.

Amike kaj numismate,

Bert

11.04.2019 9:46

Kara Bert,

jen la provlegita, plej freŝa numero de nia EN. Pli frue mi ne aŭdacus kredi, ke nia kulturo estas tiel riĉa ankaŭ ĉi-kampe. Dankon al vi kaj viaj kunlaborantoj, ke vi malkovras al ni ĉi tiun faceton de nia Esperanta mondo!

Amike: Jozefo



20.04.2019 10:39

Kara Bert!

Dankon pro tiu numero.

Mia printilo estas jam laboranta!

Salutas Walter



20.04.2019 10:45

Dankon Bert!

Estas ege informplena kaj kvalita laboro!

Mi opinas, ke la revuo estas plej impona kaj utila inter aliaj fakaj revuoj.

Viaj pristudoj estas profundaj kaj valoraj.

Sukceson!
Amike,
Euheno Kovtonjuk,
UkrEA-prezidanto



20.04.2019 11:21

Dankon pro la elstara numero de via revuo, kiun mi ĵus tralegis.

Amike

Renato



25.04.2019 14:13

Saluton, estimata.

Mi mem ne estas numismato. Sed mi prizorgas retejon pri Esperanto, kaj por ĝiaj legantoj estus interesaj informoj pri ENA kaj publikaĵoj en ĝia revuo. Krome, mi organizas regulajn E-kunvenojn en Sofio, kaj ankaŭ tie estas homoj kiujn via agado interesus, do mi volonte informus pri ĝi.

Mi ne scias ĉu necesas, ke mi aliĝu, aŭ mi simple petu la retan revuon - ankaŭ jam aperintajn numerojn, se eble.

Se necesas aliĝo, jen mia oficiala peto:

“Mi konsentas aliĝi”

Amike,

Mariana Evlogieva

25.04.2019 14:47

Saluton, estimata samideanino!

Ni tre ĝojas pro via aliĝo al ENA. Ni tutkore bonvenigas vin kiel 115an individuan membron. Tute ne gravas ke vi mem ne estas numismatino. Gravas, ke vi intencas disvastigi informojn pri nia “juna” fakgrupo pri numismatiko. Pro via laboro kiel kunlaborantino de retejo kaj organizantino de kunvenojn, vi certe povus rikolti por nia asocio novajn membrojn en via lando. Vi ja estas la unua persono el Bulgario kiu membriĝis ĝis nun.

Ni jam nun antaŭdankas vin pro via laboro favore al Esperanto-Numismatika Asocio.

Aldone ni sendos al vi en diversaj retmesaĝoj la jam aperintajn numerojn.

Amike kaj numismate

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko



04.05.2019 4:36

Kara Bert,

Dankon pro la agrabla bonveno!

Mi havas demandon por vi. Ĉu vi konas lertajn gravuristojn?

Mi serĉas iun, kiu povas fari bonegan buston de Zamenhof por unu flanko de medalo.

Mi pensis ke, per via sperto, eble vi konas gravuristojn aŭ kie mi povus trovi iun tian. Mi ne timas serĉi en evolulandoj.

Kun amikaj salutoj,

Andy Blair

Halifakso, Kanado



11.05.2019 17:37

50 Steloj projekto 2020 Julia Isbrücker

Kara Bert!

1920, baldaŭ antaŭ 100 jaroj, okazis la 12a UK en Hago, la unua UK post la Unua Mondmilito. Tie tre aktivis Julia Isbrücker. Tial mi pensas eldoni medalon en formo de 50-Stelo arĝenta monero por la honoro de Julia.

Eventualaj detaloj: Duona unco da arĝento 925, eldonkvanto 500, diametro 34 mm (kiel duona Talero).

Mia unua demando estas: Ĉu vi scias pri plano eldoni similan objekton?

Elkora saluton de

Walter

11.05.2019 22:58

Kara Walter!

Ĝis nun mi ne scias pri iu plano eldoni similan objekton kaj mi ege mirus se iu havus la saman intencon.

Mi ĝojas, ke vi daŭrigos vian unikan projekton. Krome, mi konsentas pri malpi granda kvanto. Nu, mi senhezite jam mendas du ekzemplerojn kaj intencas laŭeblece helpi vin vendi la novaĵon! Bonvolu havigi al mi skizon kaj detalojn por publikigi anoncon en la julio-numero de E.N.

Amike kaj numismate,

Bert



19.05.2019 14:08

Kara Terry!

Mi kunsendas bildojn de angla medalo, pri kiu mi bezonas plejeble multajn informojn. La du figuroj estas enigmaj. Ĉu ili estas alegoriaj aŭ historiaj, anglodevenaj personoj?

Kun via helpo mi povos priskribi la interesan artefakton en nia venonta numero.

Mi kore kaj anticipe dankas vin!

Amike kaj numismate,

Bert Boon

26.06.2019 14:29

Estimata,

Mi pardonpetas, ke mi ne pli frue respondis -problemo de sano. Tamen mi kredas, ke mi ne povas multe helpi. La kutima mallongigo de la National Union of Teachers ĉi tie estas NUT, ne NTU kiel aperas sur la medalono.

Do eble la Unio estas de alia angla-lingva lando ekz. Novzelando, Sud-Afriko, Aŭstralio, Kanado ktp.

Tamen eble temas pri frapo de iu loka asocio. Kiam mi googlis Fac et Spera teachers union (images) mi trovis bildon de insigno de simila dezajno.



ANONCOJ

&

EVENTOJ

Simpozio en Art Valley 51 (Rotselaar, 11 05 2019)



En lia kariero kiel gravuristo-skulptisto-medalisto la belga artisto Paul Huybrechts (vidu “Medalisto” en ĉi-numero) partoprenis en Mezeŭropo en multaj laborkunvenoj pri medaloj kaj etskulptaĵoj. En 2014 li mem fondis asocion sen profito, “Art Valley 51”, por povi organizi siajn proprajn laborkunvenojn, ofte por prepari kongresojn aŭ ekspoziciojn.

La 11an de majo 2019 ENA havis la okazon ĉeesti dum laborkunveno de Paul kun kvar eksterlandaj gastoj-artistoj. La kunveno celis prepari la FIDEM-kongreson en 2020 en la japana ĉefurbo Tokio, kaj la tasko de la partoprenantoj estis la kreado de arta medalo memore kaj honore al la famega scienculo Stephen Hawking. La medalo estos prezentata en la ekspozicio kaj ricevos lokon en la Internacia Kongreskatalogo.

Unu el la kvar eksterlandaj gastoj estis la al niaj fidelaj legantoj certe konata medalisto el Latvio Jánis Strupulis. Dum pli ol unu horo nia redaktoro havis la okazon malstreĉe paroli kun la “rekordulo” de esperantaj medaloj. Li kreis ne malpli ol 24 medalojn kun esperanta temo. Interparoli kun Jánis estas tre agrable, ĉar li sufiĉe flue parolas la germanan.

La ENA-revuo jam priskribis kelkajn el liaj medaloj (jk. 1/4; jk. 3/1; jk. 3/3; jk. 5/4; jk. 6/3) kaj pentris portreton de li en la rubriko “medalisto” (jk. 1/4).

Bert

A circular medal with a green hologram of a human skull in profile. The text around the edge of the medal includes "Professor Na... reasen, USA" and "Laureat of the Inba... Health Prize 2003".

Speciale medaille met hologram

Paul HUYBRECHTS

Info: medailles@telenet.be

Tel 016 23 22 95

www.medailles-paulhuybrechts.be

Freŝdata kreado de Paul estas tiu medalo kun hologramo!

ANNA-uea facila (google)



Numismatiko

Eblas aŭskulti ĉi tiun artikolon, kiun voĉlegis Derek Roff.

Ekde 2014 ekzistas fakgrupo en Esperantujo, kiu studas Esperantajn medalojn kaj monerojn. La nomo de tiu studo estas *numismatiko*. La nomo de tiu fak-grupo: Esperanto-Numismatika Asocio (ENA).

Tiu asocio eldonas revuon. Ĉu vi volas ĝian revuon kun tekstoj, fotoj kaj bildoj? Sendu al [Bert Boon](#) la frazeton: “Mi volas aliĝi”. Kvarfoje en unu jaro vi ricevos, nur per via komputilo, la dikan revuon (ĉirkaŭ 40-paĝan). Vi rajtas peti ankaŭ la revuojn, kiuj jam aperis.

ENA havas nuntempe 120 individuajn membrojn. Ankaŭ dudek Esperantaj kaj ne-Esperantaj muzeoj, bibliotekoj kaj aliaj asocioj ricevas la revuon.

Por ricevi la revuon vi pagos neniom, do ĝi estos senpaga kaj sen aldonaj kostoj.

ENA pacience atendas vian frazeton! Ĉu vi memoras ĝin?

Amike kaj numismate,

Bert Boon
iniciatinto de ENA

- **medalo:** metala disketo surhavanta bildon aŭ skribaĵon memore al iu grava okazintaĵo aŭ por montri respekton al merita homo.



ENA kore dankas Anna Löwenstein pro la artikolo, kiu jam instigis plurajn personojn aliĝi al nia asocio!!

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol kvin jaroj ĝis 128 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi nur LAŬPETE tuj ricevos perrete ankaŭ ĉiujn jam aperintajn. SENPETE sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”